

N. N. 32,

## Jen ĉiamviva Rozo

*tradukita de Leland Bryant Ross*

Jen ĉiamviva Rozo  
laŭ vorto de profet'  
El la Jiŝaja ŝoso  
ekkreskis kun impet'.  
Ĝi venis, hela Flor',  
en frida tempo vintra  
Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,  
la menciita Flor';  
Maria ĝin responsis  
el patrin-ama kor'.  
Ŝi naskis Rozon por  
klarigi Dian amon  
Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro  
per sia dolĉ-arom'  
Heligas per Digloro  
la vojon de la hom'.  
Ja homo, tamen Di',  
ĝi ŝarĝojn malpezigas  
Kaj homojn savas ĝi.

...

*Traduko de la Germana poemo "Es ist ein Ros entsprungen" de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros' Haruo).*

*Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamu1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub [http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros\\_h.html](http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html). Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.*